# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Februaro : 4 2022

## LA INTERNACIA KORTUMO APROBAS MON-KOMPENSON FAVORE AL DEMOKRATIA RESPUBLIKO KONGO

La Internacia Kortumo, jurisdikcia organo de Unuiĝintaj Nacioj kun sidejo en Hago (Nederlando), juĝis, ke Ugando devos mon-kompensi la Demokratian Respublikon Kongon per 325 milionoj da dolaroj, pro la perfortoj faritaj de sia armeo dum milito okazinta inter la jaroj 1998 kaj 2003.

En la jaro 2005 ĉi tiu tribunalo jam deklaris, ke la uganda armeo malobservis internaciajn leĝojn dum tiu milito. Oni decidis samtempe, ke D.R. Kongo rajtis ricevi mon-kompenson de Ugando pro tiuj deliktoj. Nun, post 17 jaroj de tiu juĝo, la Kortumo fiksis tiun mon-kompenson, kun la kunlaboro de sendependaj fakuloj.

La mon-kompenso devos efektiviĝi laŭ tri pagoj. La unua pago, 225 milionoj da dolaroj, celas kompensi la viktimojn de tiuj perfortoj; alia pago, 40 milionoj, utilos por pagi havaĵojn detruitajn de la ugandaj soldatoj. Fine, 60 milionoj celas pagi la detruon de naturaj resursoj. Estas necese memori, ke la posedo kaj elfosado de naturaj riĉaĵoj estis unu el la ĉefaj kialoj de tiu milito, ankaŭ konata kiel "milito de la koltano", koltano estas mineralo vaste uzata en poŝtelefonoj kaj komputiloj. La unua pago okazos en septembro 2022.



La mon-kompenson aprobis 12 el la 14 juĝistoj de la Internacia Kortumo, kaj kvankam temas pri granda mon-kvanto, sendube ĝi estas pli malgranda ol tiu petita de D.R. Kongo, kiu kalkulis mon-kompenson de 11 mil milionoj da dolaroj.

Okaze de tiu milito pli ol 5 milionoj da homoj mortis, ĉefe pro malsato kaj malsanoj. Temas pri unu el la plej kruelaj militoj en Afriko, en kiu partoprenis naŭ ŝtatoj kaj ne-regulaj armeoj, multaj el ili kun infan-soldatoj.

**ANDREO, DUKO DE JORKO, KAJ VIRGINIA GIUFFRE SUBSKRIBAS EKSTER-JUĜAN AKORDON**

Sur pasinta numero, ni sciigis pri la onta proceso kontraŭ Andreo de Jorko, filo de la brita reĝino Elizabeto la 2a. Ni memoru, ke Virginia Giuffre akuzis la britan dukon pro seksa perforto, kiam ŝi estis ne-plenaĝulo. Laŭdire, Andreo de Jorko ofte partoprenis en festoj organizataj de la usona financisto Jeffrey Epstein, akuzita kaj poste kondamnita pro prostituigo de junulinoj.

Fine, antaŭ ol submeti tiun juĝ-aferon al tribunalo en Usono, la advokato de Virginia Giuffre sciigis, ke oni atingis ekster-juĝan akordon kun la Duko de Jorko, pere de kiu, li bedaŭras sian rilaton kun S-ro Epstein. Li ankaŭ aplaŭdas la kuraĝon de S-ino Giuffre, kaj aliaj virinoj, kiuj luktas kontraŭ la seksa ekspluatado de virinoj. Same, li anoncis mon-donacon al fondaĵo de Virginia Giuffre kiu celas helpi tiujn viktimojn.




**EL JURA VIDPUNKTO** estas nova podkasto de la hispana Alejandro Burgos Escalante, jur-studento kaj membro de IJEA, kiu celas diskonigi mallongajn informojn pri juraj temoj. Vi povos aŭskulti ĝin en:

htpps://open.spotify.com/show/7vZZgrVcfGeSMPKAECJzbp

Oni povas ankaŭ legi la transkribon de la programoj en:

htpps://mallonge.net/lb

Ene de ĉiu podkasto estos eble aŭskulti mallongajn informojn pri malsimilaj juraj temoj kaj ĉefan pli longan informon pri konkreta afero. En la unua numero tiu centra temo estas: *"Al kiu apartenas la Luno?"*

Ni gratulas nian junan samideanon pro tiel impona laboro kaj ni invitas ĉiujn juristojn aŭskulti kaj kunlabori kun tiu nova iniciato uzi nian lingvon por juraj temoj

# Vorto de la Semajno

**Akordigi:** Fari, ke du aŭ pluraj aferoj aŭ personoj venu en akordon.

**Akordiĝi:** Veni en akordon.

- *Laboro de advokatoj ankaŭ estas akordigi du nerepacigeblajn partiojn.*
- *Ĉiuj partioj akordiĝis malpliigi kaj prokrastigi la ŝuldojn de la debitoro.*



Laŭdire, estas pli bone veni en malbonan akordon ol disvolvigi aferon en necerta proceso.

## Nova numero de *Jura Tribuno Internacia.*

Komence de la monato aprilo aperos nova numero (jam la 20-a!) de *Jura Tribuno Internacia*, oficiala organo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. **Kunlaboraĵoj estas ege bonvenaj.**

Do, se vi deziras verki artikolon pri jura temo, la revuo estas je via tuta dispono.

Kontaktu antaŭ la 20-a de marto kun: jurista@esperanto.ac

